# La unua UK en Portugalio

Somere 2018 kune kun Markéta kaj pli ol 1500 samideanoj el 75 landoj, mi partoprenis la 103-an Universalan Kongreson de Esperanto, kiu okazis la unuan fojon en Portugalio. La kongresurbo *Lisboa* (esp. *Lisbono*) - simile kiel itala Romo, ĉeĥa Brno kaj pola Sandomierz – kuŝas sur sep montetoj. Tamen – male al la urboj - ĝi situas ĉe la oceano Atlantika, apud la rivero *Tejo,* kies esperantan nomon portis la kongresa kuriero *Taĵo nia*.

Lisbono estas historia urbo apud Atlantiko, de kiu jam en la mezepoko maristoj forvojaĝadis malkovrante interalie la maran vojon al Hindio kaj al Brazilio, kaj unuafoje ebligis al Japanoj kontakton kun la mondo. Kaj mi malkovris, kio verŝajne interesas antaŭ ĉio miajn samlandanojn, ke sufiĉe proksime al la kongresejo, kiu funkciis en la Fakultato pri Juro de la Lisbona Universitato, troviĝas *strato de prof. Georges Zbyszewski*, poldevena geologo kaj arkeologo, kiu publikigis geologiajn mapojn kaj faris gravajn esplorojn pri paleontologio en la teritorio de Portugalio, inkluzive pri fosilioj de dinosaŭroj.

Dum la solena malfermo oni menciis pri la planota prelego dediĉita al 100-jariĝo de Esperanten-traduko de la pola nacia epopeo „*Sinjoro Tadeo*” fare de Antoni Grabowski. Ni partoprenis diverstemajn prelegojn interalie pri la kongresa temo: „*Kulturoj, lingvoj, tutmondiĝo: kien nun?*” ĉeokaze pridiskutante iaman koloniadon kaj lastatempan amasan imigradon al Eŭropo, problemojn, kiuj rilatas al tiu procezo, eblecojn helpi, sencon uzi Esperanton tiucele ktp. Oni prezentis vidpunktojn kaj ideojn de reprezentantoj de diversaj landoj kaj kulturoj.

Okazis interesaj prelegoj pri Portugalio kaj pri la lingvo portugala parolata ankaŭ en Brazilio kaj en multaj iamaj kolonioj (ekzemple Timoro, Kaboverdo, Gvineo, Makao kaj Hindujo) enkadre de la prelegserio „Portugala eksprese”. Multaj partoprenantoj atendis prelegon pri la famaj lisbonaj tramoj. Tamen, montriĝis, ke la preleganto ne povas veni, do anstataŭe okazis improvizita ateliero pri la portugala lingvo. Ekplaĉis al mi tiu lingvo.Tamen, mi konsciis, ke oni devas esti atentemaj pri kelkaj situacioj pro nekutima vortaro. Ekzemple oni povus suspektigi la ŝoforon esti teroristo ĉar demandante “kie troviĝas la plej proksima benzinstacio?” : *Onde fica a bomba de gasolina mais próxima?* oni ja demandas pri bombo ☺ (tamen, tiu vorto povas ankaŭ signifi „la pompo”, ekzemple *bomba hidráulica* = la pumpilo, *bombeiros* = la fajerbrigadistoj).

Ni ĝuis belan artan programon, inkluzive koncertojn de la tradicia portugala *fado*-muziko, onidire plenumita per sopiro de maristoj pri la patrujo aŭ pri la foraj landoj (laŭ aliaj tiu muziko esprimas emociojn de maŭraj sklavoj), ofte nomata “*la portugala bluso*”, koncertoj de grupoj folkloraj *Grupo Etnográfico de Danças e Cantares Do Minho* el norda Portugalio kaj *Grupo Folclórico de Faro* el sudo de la lando (bele vestitaj paroj, dancantaj kaj kantantaj akompane de popolaj muzikinstrumentoj, sed

unu el ili sen ŝuoj!) kaj koncertoj de samideanaj artistoj *JoMo, Kajto, Juliano Hernández Angulo, Martin Wiese, Georgo Handzlik kaj filino Dominika, Mikaelo Bronstein kaj Sergeo La Terura, Grazia Barboni, Gijom'* kaj aliaj. Belega estis koncerto de la *Internacia Koruso*.

Dimanĉe dum la unua tago de UK okazis bankedo kaj kongresa balo en la Kulturcentro de la lisbona kvartalo *Belém* (tio estas *Bet-Leĥem* alivorte *Domo de Pano*), kie ni vizitis la belegan Jerominities-Monakejon (*Mosteiro dos Jerónimos)* konstruitan en la Manuela stilo (gotiko kun arabaj influloj, kiu enhavas tipe marajn elementojn ekzemple ŝipmastojn), kaj kie okazis gravaj eventoj, interalie oni surskribis reformkontrakton pri la Eŭropa Unio, la Monumenton de Malkovrintoj (*Padrao dos Descobrimentos*), kie en ŝtona karavelo videblas interalie la skulptaĵo de Vasco da Gama, Ferdinando de Magellan, princo Henriko la Naviganto kaj aliaj, kaj Turo de Belém (*Torre de Belém*), kie laboris doganistoj kaj oni kontolis ĉiujn alvenantajn ŝipojn. Inter la portugalaj famuloj dum la UK oni menciis ankaŭ pri *Cristiano Ronaldo* – antaŭ nelonge nomita la plej bona futbalisto de la mondo. Sur muroj de domoj, preĝejoj, en metroostacioj ni ofte vidis *Azulejos* - kaĥeloj, emajlitaj kaj ornamitaj per bildo kaj surstrate nian atenton kaptis surtera mozaiko - *Calçada portuguesa*. Ni venis al la maŭra *Castelo de São Jorge* situanta sur unu el la montetoj en la historia centro de la urbo kaj vizitis ankaŭ la belan *Muzeon de azuleĵos* kie oni detale prezentas diversepokajn kaĥelojn. Kun granda intereso ni esploris *la plej grandan en Eŭropo oceanarion* en la kvartalo Oriente), kie eblas rigardi abundan maran flaŭron kaj faŭnon.

Ene de la urbo plej multe da partoprenantoj veturis al la kongresejo per metroo. Iutage, atendante alvenon de ĝia vagonaro, mi ekridetis aŭdante jenan interparolon de samideanoj: - *Ĉu plaĉas al vi la lisbona metroo? - Jes! Ĝi estas rapida kaj sekura. Tamen, ne kompleta. - Kial? - Ĉar mi ofte vojaĝas al Rato sed mankas la metroostacio Kato! Oni devas konstrui ĝin ankaŭ* ☺

Ekinteresigis min diskuto pri diversaj ideoj, okazanta en la Scienca Forumo. Oni menciis pri ebleco akiri sciencan kaj popularsciencan informon pere de fakaj revuoj, sciencaj organizoj kiuj kunlaboras interalie kun la Akademio Internacia de la Sciencoj en San Marino, retaj podkastoj de la retejo https://kern.punkto.info/ kaj la Konferenco pri Aplikoj de Esperanto en Scienco kaj Tekniko https://kaest2018.ikso.net/ kiu ĉi-jare okazos jam je la jubilea 40-a fojo.

Bela vetero akompanis nin dum la tuta semajno sed verdire estis tro varme! Suno brilis forte kaj temperaturo de aero ofte atingis 40 gradojn de Celsius. En aliaj partoj de la lando kovritaj de arbaroj bedaŭrinde okazis danĝeraj incendioj. Ni soifis kaj pro tio ĉiutage ni trinkis multon kaj ne nur akvon. Bongustis *Sangria* – malvarmumigita ruĝa vino kun citruso, vinbero kaj pomo. Kun granda apetito ni gustumis saladon de pecetigitaj fruktoj – melono, ananaso, mango, vinberoj, kiu estis vendataj en la universitataj manĝejoj.

Drinkante lokan malvarmumigitan bieron *Sagres* ni gustumis la lokan kolbason *chorizo*. Poste ni manĝis ankaŭ *la atlantikan gadon* – t.n. *pastés de bacalhau* kaj *sardinojn* en tomato-saŭco. Antaŭ la kongreso ni vizitis la urbon *Porto* (kiu donis nomon al la tuta lando) fama de sia haveno kaj loke produktata vino ĉe *Vila Nova de Gaia*. Ni brave formanĝis tie la *Francesinha* – loke popularan pikantan sandviĉon kun fromaĝo kaj kvin tipoj de viando. Krom *vinho de Porto* ni poste aĉetis ankoraŭ tipe portugalan alkoholaĵon *Mateus* kaj ĉeeokaze de vizito al Sintra boteleton de bongusta alkoholaĵo *Ginja* akirita de ĉerizoj.

Unu tago antaŭ la kongreso okazis eksterordinara, tre malofta, astronomia fenomeno: plena eklipso de la luno, kiun mi hazarde vidis en Porto, foririnte vespere al la teraso. Luno unue estis plenronda kaj poste preskaŭ tute malaperis dum pli ol unu horo antaŭ ĝia reapero. Venontfoje tia fenomeno okazos en Potugalio en la jaro 2123 do post 105 jaroj!

En turismaj lokoj bedaŭrinde ĉiam aperas ŝtelistoj kaj kelkaj partoprenantoj plendis pri tio tamen mi havis nur bonajn impresojn renkontante simpatiajn lokanojn. Unu el ili avertis min pri malfermita dorsosako, aliaj helpis trovi vojon. Plaĉis al mi ilia toleremo kiam mi provis ankoraŭ mallerte komuniki kun ili en la portugala. Tamen, plej volonte mi parolis en la "verda lingvo", kiun krom kongresanoj uzis interalie portugalaj junulinoj laborantaj en la universitata manĝejo. Miaopinie la kongreso estis tre interesa kaj partopreninda!

*Adam Wilkus*
*Rememoroj skribitaj 12a de aŭgusto 2018*